

# Espero

# Katolika

REVUO MONATA EN ESPERANTO

RELIGIO. — FILOZOFIO. — HISTORIO. — SOCIOLOGIO  
LITERATURO. — ARTO

REVUO DE REVUOJ. — BIOBLOGRAFIO. — ŜAKOJ

« Unum ovileet unus pastor » (Joh. X, 16.) « Unu ŝafaro kaj unu paŝtato ».

## ABONEJOJ de E. K.

FRANCLANDO } Ĉe la Direktoro de E. K.  
                  } Ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, PARIS V<sup>e</sup>  
                  } Ĉe liberejo Warnier kaj K<sup>o</sup>, 46, rue Sainte-Anne, PARIS.  
ANGLOLANDO S-o J. Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON.  
BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, Woorstraat, 50, Courtrai.  
BOHEMUJO-AŬSTRIO F. Topič. libr. Ferdinandova 9. Praha.  
ĈILILANDO S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679. SANTIAGO-CHILI  
HUNGARLANDO S-o Endre Varju IV, Kigyo, U. 62. em. 14, BUDAPESTO  
ITALLANDO : S-o Jakobo Bianchini, S. QUIRINO DE PORDENONE (*Udine*)  
HISPANLANDO : S-o Ant. Guinart, Escuelas Pias. VALENCIA.  
GERMANLANDO Moller et Borel, 95, Prinzenstr. BERLIN.  
POLUJO Arct. libr. Nowy Swiat, 53, WARSZAWIA.  
RUSLANDO Societo Espero, Bol. Podjačeskaja, 24, log. 12. S. PETERBURGO.  
SVISLANDO Librejo Garin, 20, rue Corrairie, GENEVO.

## REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Ce la Direktoro : P-o Em. PELTIER  
Sainte-Radegonde ; Tours (Indre-et-Loire) France

Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur  
al la Direktoro. — Manuskriptoj neniam estos resendataj

Ciuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responde nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro. — E. K. estas malfermata por ĉiuj personoj kaj por ĉiuj demandoj (escepte la politikaj).

## KONDIĈOJ DE ABONO

Abono jara : { En Francando : 4 frankoj. | Unu numero :  
 Ekster — 5 fr. | 0 fr. 50, afrankite.

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj: oktobro, januaro au marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro. Postmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.

Anoncoj. — Tuta paĝo kostos 40 frankojn ; — duona paĝo — 2 fr. ; — 4<sup>a</sup> paĝo: 15 fr. ; — 8<sup>a</sup> paĝo : 9 fr. ; — 16<sup>a</sup> paĝo: 5 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj:

Por anonci en E. K., sin turni al S-o G. Warnier, 46, rue Sainte-Anne, Paris.

## MUZIKAĴOJ DE S-INO GUIVY

Ho Mia Kor', poezio de D-ro Zamenhof.....	1 fr.
En Songo poezio de D-ro Zamenhof.....	1 fr. 60
Birdoj, Forflugu, poezio el <i>Flandra Literaturo</i> .....	1 fr. 60
La du Muloj, fablo de La Fontaine.....	1 fr. 60
Himno, poezio de P-o A. Dombrovski....	1 fr. 25

## PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA.

(1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro).

Ĉiu jaro : 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.)

Duono de la 3-a jaro (ĝis marto 1906) 1 fr.

(La tuta kolekto ĝis marto 1906 5 fr. afrankite). **Artikoloj legindaj en la kolekto** : Fremduloj (E. Peltier). Spiritoj larĝaj (E. Peltier). Greka skismo (V. E.). Sidi-Lakdar kaj lia lernanto (A. Thill). Objektiva kriterio de poezio (A. Dombrovski). Animo en malliberejo (Prof. Louis Arnould). François Coppée skizo ; ekstraktoj (E. Peltier). Ŝaklecioj por lernantoj. Diversaj artikoloj literaturaj, lingvaj ; kaj informoj pri la I-a Kongreso Esperantista, ktp. ktp.

## BIBLIOTEKO DE E. K.

Kato kun botoj (luksa eldono, 6 ilustr.).....	0 fr. 50
Cindrulino (sama kolekto, 6 ilustr.).....	0 fr. 50
(La du verkoj kune mandat'j 0 fr. 75)	
La Katolikaj Esperantistoj ĉe la II <sup>e</sup> Kongreso de Esperanto en Genevo (1906). Plena raporto, kun la prediko de P-o Em. Peltier.	0 fr. 15
Esperanto ?... Qu'est-ce ?... Franca broŝur. propag....	0 fr. 10

# ESPERO KATOLIKA

## ENHAVO

Kio do estas la Homaranismo (A. DOMBROVSKI).....	33
La Edukada demando en Anglujo (G. KEAN kaj C. SLATER).....	37
Pri Lord Acton (A. RICHARDSON).....	40
Reunuigo per la kono de la Sinjoro (P-o C. RUST).....	40
Senmakula (E.-J. WEMAES).....	44
Kion eminentaj protestantoj pensas pri la mona ejoj (E.-J. WEMAES)...	45
La lasta Abencerago (ELEDA kaj VINKO).....	46
Paĝo de l'Direktoro .....	53
Universala Komunikilo.....	55
En Esperantujo : Opinio. — Notetoj. — Bibliografio. — Muziko. — Abonmonoj Ricevitaj. — Monoferoj. — Ŝakoj	55

## KIO DO ESTAS LA HOMARANISMO ?

### RESPONDO AL S-RO HOMARANO

La novaj ideoj aperas ordinare en mondo ĉirkaŭitaj per la mallumo. La kreintoj de tiuj ideoj, certe, penas prezenti ilin al ĉiuj la plej klare kaj kompreneble. Sed tiuj penoj neniam donas tujajn rezultatojn kaj la dirita mallumo longe persiste restadas kovrante la veron, kiel nigra nuboj. Tio okazadis milfoje en la historio, tio, videble, okazas ankaŭ kun la hilelismo aŭ homaranismo. Ĉar dank' al kovranta ĝin mallumo, oni ne povas klare ĝis nun kompreni, kio estas la homaranismo ĉu oni devas ĝin rigardadi kiel ian novan religion, — ĉu kiel ian filozofian sistemon, — ĉu kiel moralan principon, — ĉu kiel simplan etikan societeton, — ĉu kiel ion ajn alian ?...

Respondante al mia artikolo pri la hilelismo s-ro Homarano penis forpeli la suprediritan mallumon. Sed, bedaŭrinde, ne sufiĉe sukcesis, ĉar li serĉis la kaŭzojn de tiu mallumo ne tie kie ili sin trovas.

Kiel unuan kaŭzon li montris la preseraron (tjemnotu anstataŭ — tjeplotu). Sed tiun preseraron mi eĉ ne estis rimarkinta, ĉar pri dogmoj de hilelismo mi legis en la teksto originala Esperanta, ne rusa.

La dua kaŭzo laŭ opinio de mia estimata kontraŭulo estis mia neatenteco. Al li ŝajnas, ke mi pli ĝuste ŝatus la hilelismon, se estus leginta pri ĝiaj dogmoj iom „pli atente“ Supozo tute arbitra kaj nevera, ĉar mi legis pri ili neunufoje kaj kun deva

atenteco. Tial nia, « malkompreniĝo » videble estas kaŭzita ne per mia ne sufiĉe atenta legado, sed per io alia. Per kio do?

Laŭ mia opinio, la diritan ĵus malkompreniĝon kaŭzis antaŭ ĉio la ne sufiĉe klara difino de hilelismo mem, aŭ pli vere, la malesto de preciza scienca respondo al la tute natura demando kio estas la hilelismo kaj al kia kategorio de homaj kreiĵoj ĝi apartenas ?

La nomo de hilelismo aŭ homaranismo per si mem donas ja al tiuj du demandoj nenian precizan respondon, ĉar vortoj kun sufikso -ismo povas signifadi tre malsamajn kategoriojn de ideoj ; iam ili signifas religiajn instruojn (ekz. katolikismo, protestantismo, anglikanismo k. c.); iam filozofiajn sistemojn (ekz. kantismo, pozitivismo k. c.); iam fundamentajn politikajn principojn (ekz. absolutismo, k. c.) k. t. p.

Al kia kategorio de „ismoj“ apartenas la hilelismo aŭ homaranismo, oni ne povas kun certeco ekkoni. Por tiu certa ekkono kaj por forigo de nedezirataj malkompreniĝoj — tre necesaj estus kelkaj klarigoj « pri la asenco kaj celoj de la homaranismo », kaj antaŭ ĉio ĝia preciza scienca difino. Sed, bedaŭrinde, tiu ĉi difino ne estis ĝis nun donita nek per la iniciatoroj de hilelismo, nek per s-ro Homarano.

Antaŭ publika anonco pri hilelismo iu mia amiko sciigis min private pri ĝi, kiel pri „nova religio“. Poste, tra leginte dogmojn de hilelismo kaj trovinte en ili anoncon pri estonta templo hilelista, mi estis tute certa, ke la hilelismo aperas kiel nova religio. Ĝin tiel konsiderante, mi ja skribis kontraŭ ĝi.

Nune do s-ro Homarano konfirmas, ke « la homaranoj ne havas eĉ la plej malgrandan intencon krei ian novan religion »... Mi ĝin kredas, ĉar ne kredi ne havas rajton. Sed ĝin kredante mi ne trovas la devan respondon alla demando : kio do estas la homaranismo ?

Ĉar, ke oni ne povas ĝin nomi ia filozofia sistemo, tio estas tute klara. La filozofiaj sistemoj serĉas ĉiam *veron teoriantan*, defendas science tiujn aŭ aliajn filozofiajn tezojn. La homaranismo do al teoria vero ŝajnas esti tute indiferenta, precipe al la religia, nomante esploron pri ĝi « afero tute sencela » ; por homaranismo valoron havas nur *praktika bono*, plifeliĉiganta la

homan vivon sur la tero ; kaj por atingi tiun bonon, la homanaroj starigas siajn *dogmojn* kaj projektas sian majestatan *templon*.

Oni ne povas ankaŭ konsideradi la homaranismon, kiel moralan principon de agado, ĉar ĝi celas ne tiom internan ŝanĝon de homa koro, kiom eksteran la plej vastan organizaĉion en la homaro. La diro de s-ro Homarano ke « sian ĉefan religian principon la homaranoj nomis « hilelismo » ne por honori pli Hillelon, ol Kriston » ne povas forigi nian malkompreniĝon kaj klarigi iom nian ĉefan demandon... Ĉar el tiu diro oni povas logike eltiri nur jenon la hilelismo estas io, kies ĉefa religia principo nomiĝas « hilelismo ». Videble, la hilelismon oni devas diferencigi de ĝia ĉefa religia principo...

Ne estante morala principo, la hilelismo ne estas ankaŭ ia etika societo ; ĉar ordinaraĵ etikaj societoj proponas al siaĵanoj nur plenumadon de certaj etikaj reguloj, dum la hilelismo postulas akcepton de siaĵ *religiaj* principoj, kiujn ĝi nomas *dogmoj*.

Tial ankoraŭ unu fojon sin prezentas al ni trudeme la demando kio do estas la hilelismo aŭ homaranismo ?

S-ro Homarano videble sentis la neceson de preciza respondo al tiu ĉi demando, kaj penis ĝin doni. Sed, bedaŭrinde, lia respondo estis donita ne en formo de scienca difino. Anstataŭ tiu lasta, li preferis uzi simplan metaforon, nomante la homaranismon — « ,ponto inter ĉiuj religioj ». Mi persone nenion havas kontraŭ tia metaforo nur mi devas rimarki ke pontoj ekzistas tre malsamaj : bonaj kaj malbonaj, sendanĝeraj kaj tre danĝeraj... Al kia kategorio de pontoj apartenas la homaranismo ? Al mi ŝajnas, ke ĝi estas ponto pendanta en aero kaj tial tre danĝera al vojaĝantoj...

Aliaĵ klarigoj de s-ro Homarano igas nin konsideri la homaranismon, kiel ian grandegan fandigiĝon de ĉiuj religioj kaj de ĉiuj nacioj en unu sennacian homaranan formikejon. Por atingi la kuufandiĝon de religioj, s-ro Homarano proponas ne esplori « la komparan valoron de ĉiuj religioj, ĉar tio ĉi estus afero tute sencela » ; por la kunfandiĝo de ĉiuj nacioj li konsilas la forigon de « barbartempa kutimo nomi landon per la nomo

de unu el la gentoj, kiuj en ĝi loĝas ». S-ro Homarano fortike kredas je la efikeco de tiuj du rimedoj. Mi do daŭrigas esti skeptikulo en tiu ĉi rilato, kaj opinias, ke nek la religia indiferecenteco povas alkonduki la homaron al vera religio, nek la forigo de nomoj ĝisnunaj Rusujo, Francujo—fari Rusojn kaj Francojn pli bonajn en morala rilato.

Fine mi devas korekti unu eraron de s-ro Homarano. Parolante pri ĉefa principo de hilelismo, li ĝin esprimas per vortoj: « agu kun aliaj, kiel vi volas, ke oni agu kun vi ; ĉio alia estas nur komentarioj ». Mi ne scias, el kie s-ro Homarano elskribis tiujn ĉi vortojn, sed ke ili ne estas Hillelaj — pri tio ekzistas nenia dubo. Ĉar Hillel'o diris jene: « ne faru al aliaj tion, kion vi ne volas, ke ili al vi faru ; en tio ĉi konsistas la sumo de leĝo ; la ceteraĵo estas nur detaloj : vi iru kaj lernu ». Kun tiu ĉi Hillel'a diro estas interese kompari la analogian diro de Jesuo: « Ĉio, kion ajn vi volas, ke la homoj al vi faru, kaj vi al ili faru. En tio ĉi konsistas la leĝo kaj profetoj » (Evang. laŭ Mateo, VII, 12). El tiu ĉi komparo klare vidiĝas, ke la vortoj elkondukitaj de s-ro Homarano estas pli proksimaj al vortoj de Kristo, ol al vortoj de Hillel'o. Kaj oni ne diru ke la senco en ambaŭ okazoj restas la sama. Neniel ! Ĉar en la vortoj Hillel' aj estas esprimata la principo de *pasiva* indiferecenteco (vi ne faru!..), dum la vortoj de Kristo predikas la principon de *aktiva* vorto (vi faru!..). En tio ĉi konsistas tre granda diferenco.

Tial la ĉefa principo de l'homaranismo estas esprimita en Evangelio kun pli granda forto, ol en verkoj de Hillel. Se ĝin akceptus ĉiuj nekristanoj, mi kiel kristano, povus nur ĝoji je tio el tuta mia koro.

Malgraŭ tio, serĉante ĉie la precizecon, mi devas tie ĉi noti, ke s-ro Homanaro neprave nomas la diritan principon de homaranismo — religia. Ĝi ne estas precize religia, ĉar ĝi ne difinas niajn rilatojn al Dio; ĝi estas nur principo morala, kiel difinanta la rilatojn nur interhomajn.

El tiu ĉi kaŭzo mi opinias, ke la dirita principo, eĉ en ĝia formuligo, donita de Kristo, se estos sola, ne povas plene kontentigi la religian homan senton. La religio de estonteco, pri kiu revas la homaranoj, estas ebla, sed ĝi povas efektiviĝi ne per pasiva silenta tolerado de aliaj religioj. Nur la fervora amo al

religia vero kaj sincera laborema serĉado de ĝi povas alkonduki la homaron al unu vera religio, kies nomo estos ne simpla homaranismo, sed Dihomaranismo.

Mi ne scias, ĉu s-ro Homanaro min komprenos. Nur unu mi dezirus, ke mia simpatia kontraŭulo ekkredu, ke mi batalas kontraŭ homaranismo nur tiom, kiom ĝi efektive povas fariĝi « kontraŭreligia kaj kontraŭnacia ». Eble mi en tio ĉi eraras pro ne sufiĉa kompreno de homaranisma esenco. Sed mi sincere deziras ĝin kompreni, kaj tial estos tre dankema, se s-ro Homanaro ekvolos iom pli detale klarigi, kio do fine estas la homaranismo.

P-RO A. DOMBROVSKI. El KOVNO (Rusujo). 7. VII. 06.

### LA EDUKADA DEMANDO EN ANGLUJO

La ĉefa demando kiu okupas la atentadon de la diversaj religiaj kaj ankaŭ politikaj partioj en Anglujo estas tiu pri elementa Edukado en la ĉiutagaj lernejoj. Dum multe da jaroj la lernejaro de la lando vidiĝis kiel bataalkampo sur kiu militado daŭrigadis inter la Ŝtat-Eklezio kaj la *Nonkonformistoj*. La Katolikoj, kiuj ne estis tiel fortaj nombre kiel la aliaj ĉefaj Eklezianoj, nur partoprenis en la batalado kiel flanka partio. Pro la sukceso de la Liberala Partio je la lasta elektado kaj pro la enkonduko de *Bilo*<sup>1</sup> en Parlamenton detruiga de l'principo de la *Denominaciaj lernejoj* : (t.e., lernejoj en kiuj oni instruas la difinitan religian dogmaron de ia Eklezio), la batalo daŭrigadis kun aldonita forto, kaj la koleremaj pasioj, jam flammigitaj, nun reekbruligas la mortantan bruletaĵon de religiaj *bigoteco* kaj *malamikeco*. Tio alvokis en la politikan arenon, tiujn, kiuj en aliaj cirkonstancoj ne eĉ ekrevus sin montri en ĝi.

Por bone kompreni la kaŭzon de tio ĉi, oni devas koni la historion de la Nacia Edukado en Anglujo dum la lasta duonjarciento. De la jaro 1817, kiam oni starigis Nacian Societon por antaŭenigi la Edukadon, laŭ la principoj de la Ŝtat-Eklezio, inter la malriĉuloj, la Angla Eklezio (ŝtata) fariĝis la ĉefa

<sup>1</sup> *Bilo* : projekto de leĝo.



agente por la disvastigado de la Edukecaj Benadoj en la elementajn lernejojn de la lando. Tiuj ĉi lernejoj estis starigataj, subtenataj kaj kontrolataj de ĝi. En la jaro 1834, la Parlamento komencis doni Konstruigajn Mon-donacojn al kelkaj el tiuj ĉi *Voluntary* (1) Lernejoj kaj poste en la jaroj 1853 kaj 1861 aliaj helpmonoj estis permesataj por la subtenado de la lernejoj, sed ĉiam kondiĉe ke la lernejoj estus memvole subtenataj, t. e., ke ili ricevus monon el aliaj devenaĵoj.

Dume la katolika Eklezio starigis lernejojn same kondukatajn. Tamen en jaro 1810<sup>a</sup> troviĝis ke tiuj lernejoj tute ne taŭgis por la bezonoj de la nacio; kaj la tiam Parlamento sin intermetis kaj leĝigis tion, kio estas konata kiel la « *W. Forster* » leĝo de 1870. Per tiu ĉi, publikaj lernejoj estis starigataj kie ajn necesaj en la tuta lando; ili estis subtenataj de la publikaj monoj urba kaj imperia. Tiuj ĉi estis nomataj « *Board* (2), lernejoj : kaj en tiuj ĉi lernejoj tiele starigitaj la leĝo ordonis ke **Oni ne devas doni instruadon pri katekismo aŭ dogmaro (religia formularo) apartenantaj al iu speciala Eklezio** ». Pro la starigo de tiaj lernejoj, la « *Voluntary* » lernejoj estis tre malhelpataj: ĉar ĉiuj estis jam tute konstruitaj — escepte tre malmultaj — per privata entrepreno kaj parte subtenataj sammaniere; la aliaj estis konstruitaj kaj subtenataj tute per la publika mono. Tial, katolikoj kaj Anglikanoj laboradis sub leĝo maljusta; ili ja devis konstruadi kaj parte subtenadi la lernejojn al kiuj ili sendis siajn geknabojn; kaj tamen, sam tempe, pagadi, per la diversaj taksoj, por la konstruado kaj kondukado de tiuj lernejoj kiuj, al ili, estis tute malamegaj, — precipe pro la supre citita regulo, kiu tute malpermesis la instruadon de ia speciala dogmaro interne de iliaj muroj.

Post jaroj plenaj de agitado kaj multe da atencoj baraktadi kontraŭ la neegaleco, la Parlamento, en kiu Balfour estis ĉefa ministro, sukcese provis la taskon en 1902.

Per la Edukada Leĝo de 1902<sup>a</sup> ĉiuj publikaj lernejoj elementaj estis metataj sub la kontrolado de la urbaj konsilantaroj kaj ricevis subtenadon de ili.

1. Konstruigita sen helpo de registara mono.

2. Kontrolata de speciala distrikta komitato.



Pro tiu ĉi favoro, la principo de privata administracio iĝis tre malforta. De tiu tempo la ĉieaj urbkonsilantaroj devis havi plenan kontroladon pri la instruado donata en la lernejoj; plie, la loka konsilantaro devis nomi almenaŭ du membrojn de la Estrara Administracio.

Tiuj kiuj jam de longe klopodis por la principoj *denominaciaj* akceptis la kompromison; kaj la *Bilo* iĝis leĝo. Tamen, anstataŭ daŭriga paco, alvenis tempo de akremeco kaj kontraŭema malpaco inter la diversaj sektanoj. Inter la pli batalemaj Nonkonformistoj subite naskiĝis aro de malkontentuloj, kiuj nomis sin « Pasivaj Kontraŭbatalantoj ». Ili firme decidis fari pasivan kontraŭeman militadon al tiu ĉi leĝo, rifuzante pagi sian *parton* de la lokaj taksoj uzotaj por subtenadi la Denominaciajn Lernejojn. Multaj vidis sian meblaron forprenata kaj vendata por pagi la taksojn; aliaj suferadis kelkajn semajnojn en malliberejo. Lume la enkonduko de flska politiko kontraŭema al Libera Negocado, farita de S-o J. Chamberlain, la diskutado pri laborado de la Ĥinoj en Sud-Afriko, kaj diversaj aliaj aferoj kunigataj, inklinadis malorganizi kaj senkreditigi la Konservativan Partion en Anglujo. La Liberala Partio tuj ekvidis la situacion, kaj per senĉesa agitado kaj lertega organizado forpelis la Registaron de S-o Balfour. Post la ĝenerala elektado kiu sekvis, la Liberala Partio reeniris Parlamenton, ĝuante plenan potencon, per la plej granda nombro da membroj, kiun oni iam antaŭe vidis kaj kiu superis multege la antaŭvidojn de la plej konfidemaj esperuloj de la partio. Tio kreis konsternegon en la vicoj de la kontraŭuloj. La unua uzo farita de tiu nova potenco estis la enkonduko de Bilo, tiel kontraŭlibera en sia naturo, ke per ĝia unua artikolo ĉiuj denominaciaj lernejoj devos malaperi por ĉiam. Plie oni forĵetis ĉiun oportunon por instruadi la geknabojn pri la dogmaroj de la Katolika kaj Ŝtata Eklezioj, en la lernejoj konstruitaj de tiuj ĉi Eklezianoj. Tiu ĉi Bilo estis ricevata de la Nonkonformistoj kun esprimoj de granda ĝojo. Sed kiel ĝi estis sukcese kontraŭbatalata kaj kiel la Katolikoj en Anglujo faris sian eblon por atingi tian rezultaton oni legos en la venonta numero de E. K.

Verkita de P-o GODRIC KEAN St Vincent's. Openshaw. Anglujo.  
Tradukis CHAR. SLATER (el sama loko).

## KION PENSI PRI LORD ACTON ?

De kelkaj semajnoj la « *Tablet* », la ĉefa gazeto katolika Angla, publikigis interesan korespondadon pri la estinta Lord Acton, tre klera historia profesoro ĉe la Kambriĝa Universitato. Tiu korespondado estis pri nova libro eldonita de la fama Pastro Gasquet, O.S.B. : *Lord Acton and his circle*.

Bedaŭrinde, dum kelkaj jaroj post la Vatikana Konsiliĝo, Lord Acton, amiko de D-ro Dollinger, skribis kaj parolis ofte en maniero neinda de bona katoliko. Ekzemple, aperis antaŭ nelonge kolekto de liaj leteroj skribitaj al S-ino Dew, protestanta, filino de S-o Gladstone. Estas Malfacile kredi, ke katoliko povis esprimi tiajn opiniojn. Tamen la libro de P-o Gasquet, kaj precipe la longa korespondado publikigita en *Tablet*, pruvas, dank'al Dio, ke, dum la lastaj jaroj de sia vivo, Lord Acton ofte montris per agoj kaj paroloj la sincerecon de sia kredo. Plue lia morto estis tre edifa. Ĝi estis la morto de humila kaj penta kristano.

Jen estas la konkludo, laŭ ni ĉar ĉiu peko estas pardonebla, ni, katolikoj, devas ĵeti vualon sur la bedaŭrinda estinto de Lord Acton kaj nur memori la grandegajn servojn faritajn de tiu klerulo al la katolika kaŭzo; memoru ni ankaŭ lian edifan morton.

A. RICHARDSON (El Bruxelles).

## REUNUIGO PER LA KONO DE LA SINJORO :

(Prediko farita en la Templo de la Aŭditorio en Ĝenevo, Dimanĉon, la 2-an de Septembro, 1906, de JOHN CYPRIAN RUST, Pastro de la angla Eklezio, el Soham, Angllando.)

« Oni faros nek difekton nek detruon en mia sankta monto ĉar la tero estos plenigita de la kono de la Sinjoro, kiel la akvoj plenigas la maron. (Jesajo ĉap. 11, vers. g.).

## Karaj gefratoj en Kristo :

Kiel Esperantistoj, ni jam spertis novan senton ni jam aŭdis la fortan vokon, kiu nun de loko flugas al loko. Kiel Kristanoj, ni antaŭlonge aŭdis la mandaton pri frateco ni aŭdis la vortojn de preĝo, venantajn al ni tra deknaŭ centjaroj

ene : “ Kiel Vi, Patro, estas en Mi, kaj Mi en Vi, ke ili estu unu en Ni ; ni aŭdis voĉon de promeso eĉ pli antikva : “ Oni faros nek difekton nek detruon en Mia sankta monto. Ni sopiras al ia efektiva paco, frateco, unuiĝo, inter la servantoj de la Unu Dio. Ne estas do mirinde, se ni provas kunigi la novan senton kun la malnova mandato, — la novan fortan vokon kun la preskaŭ forgesitaj preĝo kaj promeso. Ne estas mirinde se ni turnas nin al nia lingvo kun espero, — espero ke ĝi helpos nin antaŭeniri al la celo, kiun la mandato, la preĝo, la promeso prezentas al ni.

Sed ni ne devas esti trop esperplenaj : ni ne devas trompi nin per vantaj revoj. Rigardu la nun unulingvajn landojn, ekzemple Anglujon. Ĝi ne posedas religian unuecon. Rigardu la nun diverslingvajn landojn, ekzemple Svisujon. La lingvaj limoj estas tute malsamaj ol la religiaj limoj. Kial do ni pensus ke la posedo de komuna *dua* lingvo forviŝos la religian malsamecon ? Ne ! nia lingvo povas esti kiel oleo kiu faciligas la movadon de la radoj ĝi ne povas esti la moviga povo de la veturilo kiu antaŭenportos nin en la vojo al la glora celo de Kristana unuiĝo.

Ni memoru ankaŭ ke estas senutile paroli pris Kristana reunuiĝo, se per tio ni nur signifas, ke aliaj Kristanoj devos esti konvertataj al nia formo de Kristaneco. Tio estas nur revo. Niaj apartaj formoj de Kristaneco estas kiel steloj kiuj gvidis nin mem, — dak’ al Dio, — sed ni devas atendi tempon kiam la suno leviĝos, kaj ĉiuj la steloj paliĝos kaj fine perdiĝos en ĝia venkanta lumo.

Kien do ni nin turnos ? En kia parto de la ĉielo ni atendos la unuajn antaŭsignojn de la venonta tagiĝo ? la unuajn radiojn de la leviĝonta suno ? Mia teksto donos al ni iom da helpo por respondi al tiu ĉi demando. “ Oni faros nek difekton nek detruon en Mia sankta monto, ĉar la tero estas plenigita de la kono de la Sinjoro.

*Unue* do, ni turnu nin al niaj misioj por la disvastigado de la Evangelio, precipe en la Oriento. Ili klopodas plenigi la teron je la kono de la Sinjoro. Kaj aperas radio de espero, jene. Niaj religiaj diskutadoj tre atentigas demandojn pri Eŭropa his-

torio. Ekzemple, se protestantoj diskutas kontraŭ katolikoj, gravaj demandoj sin montras pri la karaktero de Martino Lutero aŭ Ulriĥo Zvinglio aŭ Johano Kalvino; pri la mezepokaj papoj; pri la Inkvizicio; pri la Konsilioj Konstanca, Tridenta, kaj, en nia epoko, Vatikana. Kiam Rom-katoliko diskutas kontraŭ Rus-ortodoksulo, jen demandoj pri la konsilio en Firenco aŭ la enkonduko de la vorto *Filioque* en la tempo de Karlo la Granda. Plie, nia teologia vortaro kaj nia dogma idearo venis al ni multparte el la verkoj de Sankta Aŭgustino kaj Tertulliano. Nu, supozante ke, per la laboroj de niaj misiistoj, eklezioj formiĝos en Japanujo, en Ĥinujo, en Indujo, — ne nur branĉoj de Europaj trunkoj, sed memstaraj, — ĉu ili ne diros? “Kiamaniere ĉiuj tiuj demando pri Europa historio koncernas nin? Kial ni devas lerni nian teologian lingvon el la buŝo de Latinaj instruistoj? Ne! ni studos mem la vorton de Dio, kaj ni forĵetos la ĉenojn kiujn la okazintaj aferoj en alia kontinento forĝis por ĝi.” Kaj ilia agado siavice havos influon sur ni. La konvertitoj konvertos la konvertintojn, — almenaŭ novaj manieroj de pensado pri nia religio malkovros sin, kaj iom post iom estos eble elpensi Kristanecon, kiu estos nek Eŭropa nek Azia, nek Latina nek Greka, nek partia nek nacia, sed vere universala. “Oni faros nek difekton nek detruon en Mia sankta monto Ĉar la tero estos plenigita de la kono de la Sinjoro, kiel la akvoj plenigas la maron.”

*Due*, ni turnu nin al nia komuna agado pri filantropio. Ekzistas multe da laboroj por bonfarado al homoj en kiuj la anoj de ĉiuj eklezioj povas partopreni, — kaj efektive partoprenas eĉ nun. En ĉiuj landoj (mi kredas) personoj el diversaj religiaj konfesioj troviĝas kune agantaj por la administracio de multaj specoj de bonfarado, — ekzemple, pri la zorgo de malsanuloj, de malliberuloj, de frenezuloj, de blinduloj; pri la malpliigo de krimo, de mizero, de suferado: pri la edukado, paco, justeco — en multaj manieroj. Kaj renkontante unu la alian pri tiaj komunaj celoj, oni trovas ke la deziro sekvi en la paŝoj de la Savinto estas por ĉiuj la sama: kaj sekve malaperas reciproka malamo kaj malestimo.

Kaj ĉu la klopodo al tiaj celoj ne estas la kono de la Sinjoro ? Dio parolis al la reĝo Jehojakimo per la profeto Jeremio jenajn vortojn — “ Ĉu ne via patro faris justecon kaj rajtecon ? Li juĝis la procesojn de la malriĉuloj tiam li prosperis ĉu ne tio estis koni min ? diras la Sinjoro. “ (Jerem. xxii. 15). Jes, miaj gefratoj : sekvi Kriston estas koni Kriston. Li ĉirkaŭiris bonfarante kaj la bonfarado estas la plej rekta vojo al la kono de Li. Do, ju pli la bonfarado fariĝos internacia kaj universala, des pli la tero estos plenigita de la kono de la Sinjoro, des pli proksimiĝos la foresto de malpaco en la sankta monto kaj la unuiĝo de ĉiuj Kristanoj en Jesuo Kristo.

Vi komprenos ke, por atingi tiun celon, — por fari la bonfaradon internacia kaj universala, — nia kara lingvo povas alporti multegeda helpo. Ĝi ne estos la moviga povo, kiu estas kaj ĉiam estos la amo al Kristo, sed ĝi povas faciligi la movadon, kaj tiel ĝi estos uzata por la plej noblaj celoj, — la bonfarado al homoj kaj la gloro de Dio.

Permesu al mi rakonti mallongan alegorion, kiun mi legis en presita prediko de unu el miaj amikoj.

En unu planedo de la suna sistemo, ekzistis valo en la norda hemisfero, proksime de la norda poluso. Tiu valo estis ĉirkaŭita de altaj krutaj montoj, apenaŭ transpaseblaj. En tiu valo estis multe da mizero, — malsanoj, doloroj, laboroj ; kelkafoje troa varmeco, kelkafoje troa malvarmeco ; fulmotondroj, ventegoj, tertremoj. La enloĝantoj havis sufiĉe da suferado, sed ili sciis, ke en la suda hemisfero, proksime de la suda poluso, ĝuste en la kontraŭpieda punkto de la planedo, estas glora urbo, ĉirkaŭita de belegaj pejzaĝoj, kie neniam povas ekzisti difekto, doloro, detruo, sed la vivo estas ĉiam kaj ĉiamaniere feliĉa. Tial, tre multaj el la tie loĝantoj provis transpasi la montojn. Dum multaj jaroj, la plimulto iris okcidenten, dirante ke oni devas sekvi la sunon poste, kelkaj komencis iri orienten, dirante ke oni devas turni la vizaĝon al la sunleviĝo : kaj la okcidentamentoj diskutadis kontraŭ la orientamantoj kaj ili mokridis kaj kruele persekutadis unuj la aliajn. Post kelkaj jaroj, aperis nova partio, kiu diris ;

“ Iru suden, ĉar tie la suno estas plej alta. ” Kaj ambaŭ, la okcidentamantoj kaj la orientamantoj, konsentis pri unu afero, nome, mokridi kaj persekutadi la sudamantojn. Fine, kelkaj komencis diri: “ Ni tute ne pensos pri la suno: ni iros norden. ” Tiuj ĉi lastaj estis ja simple frenezuloj: la aliaj kompatis ilin: sed ilia ideo pri la nordo estis tro ridinda por serioza diskutado. Tamen, kio okazis? Kiam la transpasintoj de la montoj per la okcidenta vojo venis, post duongloba vojaĝo al la kontraŭpieda loko, ĝis la bela urbo, — jen, alvenantaj el la kontraŭa flanko, la orienten pasintoj. Baldaŭ en la saman lokon venis la suden transpasintoj kaj fine, eĉ tiuj frenezuloj, kiuj, kontraŭ ĉiu kutimo kaj tradicio, kuraĝis serĉi vojon trans la nordaj montoj. Neniu mankis, escepte tiuj, kiuj neniam provis foriri el la malfeliĉa valo. *Ĉar tiu planedo estis sfero.*

Ne estas necese, miaj geamikoj, ke mi klarigu tiun ĉi alegorion. Sammaniere ni esperas ke ĉiuj, kiuj penas servi nian Savinton, kunkolektiĝos fine en la ora urbo, per kiu ajn vojo ili forkuris el la mondo, per kiu ajn vojo ili sekvas la komunan Sinjoron, per kiu ajn sindonemeco ili provas antaŭenigi Lian regnon. Ni esperas, kaj kredas, ke kun ĉiuj, kiuj amas la Sinjoron Jesuon Kriston, estas la favoro de Dio en la estanta vivo: kaj ke en la estonta vivo estos la vera kaj fina reunuiĝo de la tuta Kristanaro, kiam ĉiuj unuanime kaj unuvoĉe laŭdos la Patron, Filon, kaj Spiriton Sanktan, — unu Dio, — al kiu estu gloro je la eterneco. AMEN.

---

### SENMAKULA (1)

Senmakula Dipatrin',  
 Nia vivo, ĝoj', espero;  
 Dolĉa, kara Virgulin',  
 Ni vin amas kaj laŭdegas.  
 Gaje kantas ni, Mari'!  
 Senmakula estas vi!

---

1. Kantita dum la meso por la Katolikaj Esperantistoj, en la Preĝejo S. François, en Genevo, la 2-an de septembro 1906.

Elektita de l'Sinjur',  
 Inter ĉiuj la virinoj,  
 Estas vi la ĉasta flor',  
 Kiu ĉarmis la Spiriton.

Gaje kantas ni, Mari' !

Senmakula estas vi !

Stelo pura de l'maten',  
 Kiu antaŭiris Sunon  
 Promesitan en Eden'  
 De la kompatema Dio.

Gaje kantas ni, Mari !

Senmakula estas vi !

Apud kruco sur Kalvar',  
 Kie pendis via Filo,  
 Dipatrino, de l'homar'  
 Vi fariĝis la patrino.

Senmakula, benu nin,

Ni eterne laŭdos vin.

E.-J. WEEMAES (El Loveno).

### KION EMINENTAJ PROTESTANTOJ PENSAS PRI LA MONAĤEJOJ

Okaze de malamemaj atakoj kontraŭ la monaĥinoj de Malersdorf en Bavario, fariĝis oficiala enketo, kiu pruvis plene la malicon de la kalumniintoj. En komenco de majo, dum kunsido de la Senato, la Ministro senkulpigis elokvente la monaĥinojn. Poste parolis Markizo Cramer-Klett; liaj deklarioj estas des pli rimarkindaj, tial ke li estas protestanto. Jen lia parolado:

« La Ministro, senkulpiginte la monaĥinojn kalumniitajn, devigis la dankon, ne nur de la, pro naskiĝo, defendantoj de la monaĥejoj, sed ankaŭ de ĉiuj, kiuj kore deziras la konservadon de la religio kristana kaj de la ideoj kristanaj en la societo.

« Mi ne ŝanceliĝas deklarii, kaj mi estas nepre konvinkita, ke la ordenoj religiaj de l'okcidenta Eklezio estas la eminentularo de la kristanoj, la floro de l'kristanismo. Eble oni kontraŭdiros, ke mi naskiĝis, ke mi estas edukita kaj ke mi vivas en alia konfeso religia, do ke mi ne povas juĝi *sciante la kaŭzon*. Tiu ĉi cirkonstanco plivole min rajtigas diri, ke mi povas juĝi pli-



senpartie ol tiuj, kiuj, pro sia kredo heredita, vidis de l'infaneco la veston monaĥan kvazaŭ ĉirkaŭita de ia glorkrono. Por protestanto, kontraŭe, monaĥo, monaĥejo estas kvazaŭ io nenormala kaj timiga. Nu mia juĝo fondiĝas sur mia sperto persona.

« Sperte mi sciigis ke l'ekzameno atenta de la vivo monaĥa nin plibonigas, nin tiras antaŭen, nin igas ŝati la grandajn problemojn moralajn kaj la valoron de l'idealo. Kaj mi ne faros al aliuloj la insulton kredi, ke l'ekzameno eĉ supraĵa de tiu vivo ilin lasus indiferentaj, ne allogus ilin reeniri la bonan vojon, se ili ĝin forlasis, kaj precipe antaŭgardi la junularon je pereigaj eraroj.

« Certigante ke la monaĥejoj elmontras la eminentularon de l'kristanismo, mi ne sole rememoras la tempojn pasintajn. En la historio la kalkuloj de l'antaŭaj jarcentoj ne estas pagataj de la posteuloj; kaj se la ordenoj religiaj ne havus aliajn meritojn ol tiuj, kiujn ili havis tempe de Tomo Akvina aŭ de Francisko Asiza, mi neus al ili la rajton nune ekzisti. Sed hodiaŭ ili elmontras ankoraŭ la eminentularon kristanan, tial ke ili efektivigas en bonega formo l'ideon kristanan, per la malriĉeco, la memforĝeso kaj l'obeo.

« Oni ne prezentu la kontraŭdiron de la grandegaj riĉecoj de l'kongregacioj. En landoj, kie la blenoj ekleziaj estas laikigitaj, oni ne povas jam paroli pri riĉeco kaj lukso. Kiam domo de 50; 80 aŭ 100 membroj, kiu plue havas lernejojn kaj hospitalojn, posedas kelkan bienon, necesan por plenumi siajn devojn kaj ĝenerale por vivi, laŭ mia opinio, tio estas fakto perfekte normala; sed, kontraŭe, mi konas multajn societojn religiajn, kiuj, dum longaj jaroj ne sciis de kie alvenus la morgaŭa nutraĵo.

« La ĉasteco kaj l'obeo: jen aĵoj, kiuj, nuntempe kiam « ĝojege vivadi » estas la ĝenerala devizo, pruvas klare ke ekzistas ankoraŭ vera, sincera kristanismo en tiu ĉi mondo!.....

« Ni faru ankoraŭ pruveton kontraŭan. Ĉiufoje kiam oni volas ataki la Eklezion kaj la Kristanismon, la unuaj batoj falas sur la monaĥejojn....

» La motivo? Ĝi estas, ke la vivo religiula ĝenas tiujn, kiuj volas subfosi ĉiun aŭtoritaton: tiujn, kiuj nur havas kulton por la materio.

« La motivo ? Ĝi estas, ke la ordenoj religiaj estas la viva pruvo de la malvereco de l'dogmoj predikataj de tiuj, kiuj pretendas liberigi la mondon je « la dogmo » ! Mi povas nur ripet<sup>i</sup> l'esprimon de mia dankeco al la Ministro de l'kultoj, kiu tiel kuragege, juste kaj delikate defendis la societojn atakitajn. »

Tia proparolado, eldirita de altestimata sinjoro protestanta, kompreneble impresis vive la altan kunvenon. La impresoj pligrandiĝis, kiam la ĉefa indeculo de la Bavaria Eklezio protestanta, la prezidanto de l'konsistorio, D<sup>ro</sup> von Schneider, levigis por fari jenan deklaron oficialan :

« Estos fakto memorinda, ke membro de tiu ĉi alta kunveno apartenanta al la Eklezio protestanta, venis fari apologion tiel varman kaj entuziasman de la vivo religiula, kiu estas karakteriza praktiko de l'Eklezio katolika. Mi komprenas perfekte la rezonojn de Markizo Cramer-Klett, kaj mi ne ŝanceliĝas deklari malkaŝe, ke historia studo de la ordenoj religiaj dum la mezjarcentoj konvinkas, ke la monaĥaro treege servis ne nur al la kredo kristana, sed ankaŭ ĝenerale al la civilizacio. Kiel protestanto mi rememorigas ke la Reformo superigis aliajn ideojn en la praktiko de la religio... Sed mi ne volus suspekti, ke mi juĝus malfavore la monaĥejojn de l'Eklezio katolika. Mi konfesas volonte, ke ili havas grandegajn meritojn al sia kredo, kaj mi aliĝas al la laŭdo, kiun nia respektinda raportanto dediĉis al la sindonemo de la monaĥinoj atakitaj. Mi povas nur esprimi la deziron, ke la du konfesioj daŭrigu fari la bonon en nobla superemo ».

La katolikaj Senatanoj Bavariaj ne bezonis sin intermeti; iliaj kolegoj protestantaj havis sufiĉan noblecon de karaktero por pravigi la pravigindojn.

El « *Le Patriote* » de Brussel, (Belgujo).

Esperantigis E. J. WEEMAES, el Loven.

---

## LA LASTA ABENCERAĜO

de Chateaubriand (*Sekvo*).

Don Karlos, mirigita pro respondo de l' Maŭro, rigardis lin duon-admire kaj duon-kolere. Subite

« Estas mi, kiu cin ricevos kiel kavaliro! Pri tio ci estas inda.

Aben-Hamet genufleksis antaŭ don Karlos, kiu lin kisis, frapante trifoje per la plataĵo de sia glavo; poste don Karlos zonis al li tiun saman glavon, kiun l'Abenceraĝo eble enigis en lian bruston; tia estis la antikva honoro.

Ambaŭ saltas sur ĉevalojn, eliras ekster la muroj de Grenad, kaj rapidas al fontano de l'Pino. La dueloj inter Maŭroj kaj Kristanoj de longe famigis tiun-ĉi fonton. Tie Maliko Alabeso duelis kontraŭ Poncio de Leon'o kaj l'Altmajstro de Kalatrava mortigis la valorulon Abajados'on.

Ankoraŭ oni vidis alkroĉitajn al pinaj branĉoj la armilajn rompaĵojn de tiu Maŭra kavaliro, kaj oni ekvidis sur ŝelo de l'arbo kelkajn literojn de funebra skribaĵo.

Per la mano Don Karlos montris la tombon de Abajados'o al 'Abenceraĝo : « Imitu, li kriis al li, tiun bravan nekristanon, kaj de mia mano ricevu bapton kaj morton ».

— Eble morton, respondis Aben-Hamet' : sed vivu Allah' kaj la Profeto ! » Tuj ili interspacigis kaj kuris furioze unu al l'alia. Ili havis nur siajn glavojn. En la bataloj Aben-Hamet' estis malpli lerta ol Don Karlos, sed la kvalito de liaj armiloj, jam provitaj en Damas, kaj la malpezeco de sia araba ĉevalo, tamen donis al li ian superecon kontraŭ sia malamiko. Li rapidigis sian ĉevalon, laŭ la Maŭra maniero kaj per sia akra larĝa piedingo, li tranĉis la dekstran kruron de l'ĉevalo de Don Karlos, sub la genuo.

La ĉevalo vundita falis, kaj Don Karlos', eljetita teren pro tiu sukcesa bato, paŝis al Aben-Hamet' levante la glavon.

Aben-Hamet saltas teren, kaj bravege kontraŭstaras Don Karlos'on. Li evitas la unuajn batojn de l'hispano, kiu rompas sian glavon sur la Damas'a fero. Dufoje trompita de l'sorto, Don Karlos' ploras koleregajn larmojn, kaj krias al sia malamiko « Frapu, Maŭro, frapu ! Don Karlos senarmigita cin ekcitas, cin kaj cian tutan nekristanan rason. »

— Ci povis min mortigi, respondas l'Abenceraĝo, sed mi neniam intencis fari al ci eĉ plej malgrandan vundon : mi volis

# ŠVIESOS LAIŠKELIS

SAVAITINIS POLITIKOS LAIKRAŠTIS.

„ŠVIESOS LAIŠKELIO“ kaina su prisiuntimu Vilniuje ir kitur: metams—1 r., pusmečiui—50 k., 3 mėnesiams—25 k. Užsirašusiems „Šviesa“—„Šviesos Laiškelis“ siunčiamas veltui (dikai).

Laiškai ir pinigai laikraščio apmokėjimui siųsti reikia pagal šio adresą: Vilnius, Odinė (Koževenaja) gatvė, № 11 „ŠVIESOS“ ir „ŠVIESOS LAIŠKELIO“ Redakcija ir administracija.

## Tautiečiai būkite atsargūs!

„Vilniaus Zinių“ № 243 randame gana įdomų užkvietimą su šiuo antgalviu: „Vilniaus Vyskupystės kunigams“. Čia p. kun. Kukta, kaip rodo išgalvotas nuodėtuvių ir visos Lietuvos, kviečia lietuvius kunigus, „Jo Ekscelencijai Vyskupui jau leidus (reikia suprasti Vyskupui Ropui) prašome nepažtingėti atvykti lapkričio 16 dieną prie Šv. Mikalojaus, bažnyčios bute“... (Po tuo „prašome“ reikia suprasti: Jo didybę kun. Kukta). Rašo kun. Kukta, jog daug atsirado svarbių reikalų ir kilo daug įvairių klausimų, kurių dėlei jisai, leidus maloniai kun. Vyskupui Ropui, kviečia lietuvius. Stebėtinu yra dalyku, kad tas kun. Kukta, kurs drįso konfiskuoti iš lietuvių knygynėlio tautiškos italpos knygas, pirktas už lietuvių pinigus, kaip antai: „Lenkai Lietuvoje“ ir „Lenkai ir Lietuviai“, to dėlei tikrai, kad tos knygėlės priešingos yra lenkomanų dvasiai, tas kun. Kukta, kuris rinko lietuvius, begiodams nuo vieno pas kitą, idant pasi-

rašytų po žinoma visiems lietuviams konstitucija K. K. D. P., tas kun. Kukta, garsus, savo laike, dvasiškas cenzorius pasakos „Kuilyš generolas“, iš priežasties kurio mūsų tautiečiai turėjo teip daug nukentėti, tas kun. Kukta, kurio niekas iš lietuvių visuose svarbesniuose mūsų Tėvynės darbuose nematė, tas kun. Kukta, kuris norėdamas pasigerinti lenkomanijai, o paskui pasinaudoti iš jos malonės, skelbė begėdiškai per visą laiką ir dar pirm lietuviško lenkiškus pamokslus, tas pataikunas ir liškis, kuris niekad ne piršto ne pridėjo prie tautiško darbo, tas šendien drįsta viešai ir publiškai per laikraštį „Viln. Žin.“ kviesti lietuvius apsvarstymo dėlei svarbių Lietuvos reikalų ir įvairių klausimų. Žinomi mums labai gerai, ponas Kukta, tavo svarstymai ir įvairūs klausimai! Matome mes aiškiai tavo žabangus ir tinklus, kuriais, sudrumstame vandenyje, tu nori gaudyti Lietuvos žuvelės! Vargiai tau tas nusiseks!

*A. Škilvis, J. Pakalnis. I. Kazlovskis P. Budrius.*

## Svarbiausieji atsitikimai.

Balandžio mėnesio 3 dieną 1892 metais vyriausybė buvo užginusi **slapčia** mokyti vaikus Lietuvoje ir Lenkijoje. Kiekvienas, kuris mokydavo vaikus namie, būdavo baudžiamas pinigais ir kalėjimu. Dabar **tas įstatymas yra jau panaikintas: vyriausybė isakė nebebausti už slaptą mokymą.**

Ant Varšuvos - Vienos geležinkelio stoties Rogovo spalio 26 d. buvo toks atsitikimas. Vakare atėjus traukiniui, užpuolikai apstojo stotį ir ėmė šaudyti iš revolverių.

Paskui metė bombą po vagonu, kur buvo kareivių sargyba. Plyšdama bomba sutrupino vagoną ir sužeidė 13 kareivių. Vagono dangtis krizdamas užmušė stoties žandarą. Netrukus jie metė ir kitą bombą po krasos vagonu. Nuo sproginimo bombos tapo suardytas vagonas ir užmuštas krasos valdininkas. Keliatas užpuolikų užšoko ant garvežio ir nuginklavo mašinistą. Kiti vėl apstojo telegrafą ir baugindami mirtim neleido telegrafuoti apie atsitikimą. Kokia dešimtis žmonių išilaužė suardytąjan krasos vagonan ir pasiėmė visus, kiek ten buvo, pinigus. Išviso pinigų jie išnešę 84.000 rublių. Paskui užpuolikai užkabino raudoną vėliavą, sutrimitavo ir įsėdę vežimuosna nuvažiavo. Vis tai buvo padaryta per 15 minučių.

Pagal sąskaitų, išviso išplėšta pinigų revoliucijos reikalams arti 3,000,000 (trijų milijonų) rublių.

## Žinių-žinėlės.

**Vilniuje.** Prasideda jau priešrinkimų agitacija. Susitvėrė jau lenkų komitetas. Jie kandidatu stato, kaip girdėjome, kun. Maciejevičių. Susitvėrė teipat ir lietuvių komitetas.

Liet. Soc.-Dem. Partija tariasi su „Bundu“ ir kitomis kairiomis partijomis.

— „Sieviero-Zap. Głos“ praneša, kad seredoje, Lapkričio 1 d., buvo lenkų miesto rinkimo komiteto posėdis, kuriame dalyvavo 49 žmonės. Rinko kandidatus Valstybės Dūmon. Kun. Maciejevičius gavo 28 balsus, Montvilas—13, Vrublevskis—6, Nedzialkovskis—2. Tokiu būdu kandidatu Valstybės Dūmon lenkai pastatys kun. Maciejevičių.

— Karo lauko teismas pasmerkė 3 žmones mirtin.

— Netrukus Vilniuje imsiąs buk eiti kasdien baltarusių kalba laikraštis, vardu; „Nasza Niwa“ (mūsų dirva).

— Greitu laiku Vilniuje išeis savaitinis laikraštis lenkų kalboje. Pakraipa laikraščio bus radikališka.

**Tiflise** uždengtos visos vidutinės mokyklos.

**Kazanius.** Ant Volgos upės ledo gabalas permušė Nobelio žibalo baržą. Išbėgo arti 80 tūkstančių pudų žibalo.

Gen.-gubernatorius Meller-Zakomelskis atvažiuos Rygon pirmose š. mėn. dienose. Gen.-gubernatoriu jis bus tik laikinai ligkol nenurims šalis ir nebus įvestos reikalingos permainos. Paskui turbūt bus paskirtas Varšavos gen.-gubernatoriu. Greitu laiku Estlandijos (Igaunijos), Kuršo ir Liflandijos (Vidžemės) gen.-gubernatoriai bus atmainyti ir visas Pabaltijos krašto valdymas bus atiduotas Meller-Zakomelskui.

Gautos žinios kad Pabaltijos krašte, valdžia nužudžiusi išviso daugiau, kaip 2.000 žmonių.

Šiais metais politikos nusikaltėlių visoje Rusijoje sėdi kelėjimuose i **300 tūkstančių**; kasdien jiems išleidžiama 15 tūkstančių rublių, skaitant po 5 kapeikas kiekvienam kaliniui.

**Poznaniuje** (Vokiečių Lenkijoje) arti 40,000 lenkų-vaikų atsisakė mokytis tikėjimo vokiečių kalboje.



nur provi al ci ke mi estas inda esti cia frato, kaj malebligi ke ci malestimu min. »

En tiu ĉi momento, oni ekvidas polvan nubon : Laŭtrek kaj Blanka rajdis du Fez'ajn ĉevalinojn, pli malpezajn ol la ventoj. Ili alvenas ĉe la Pin'a fontano kiam la duelo ĵus ĉesis.

« Mi estas venkita, diras Don Karlos' ; tiu kavaliro donis al mi la vivon. Laŭtrek, eble vi estos pli feliĉa ol mi.

Miaj vundoj, diras Laŭtrek per nobla kaj gracia voĉo, permesas ke mi rifuzu batali kontraŭ tiu ĝentila kavaliro. Mi ne volas, li diris ruĝigante, koni la subjekton de via malpaco kaj penetri sekreton kiu eble alportus funebbron en mia koro. Baldaŭ mia foresto remetos pacon inter ĉiuj, escepte se Blanka ordonos al mi resti ĉe siaj piedaj.

— Kavaliro, diris Blanka, vi restados apud mia frato, mi estos por vi kiel fratino.

Ĉiuj koroj tie ĉi suferas pro ĉagrenoj. Vi konos de mi, kiel oni toleras la malfeliĉojn de l'vivo.

Blanka volis ke la tri kavaliroj reciproke manpremu : ĉiu rifuzis.

« Mi malamegas Aben-Hamet'on ! ekkriis Don Karlos'.

— Mi envias lin, diris Laŭtrek.

— Mi estimas Don Karlos, diris l'Abenceraĝo, kaj mi plendas Laŭtrek, sed mi ne povus ami ilin.

— Ni daŭrigu interrilati, diris Blanka, kaj frue aŭ malfrue l'amikeco sekvos l'estimon. Neniam estu konata de Grenad la fatala okazo kiu kunigis nin tie ĉi.

De tiu momento, Aben-Hamet fariĝis milfoje pli amata de la filino de l'duko de Santa Fe l'amo ŝatas la bravecon : nenio mankis al l'Abenceraĝo, tial ke li estis bravema kaj Don Karlos ŝuldis al li la vivon. Aben-Hamet, laŭ la konsilo de Blanka, detenis sin dum kelkaj tagoj veni al la palaco, por ke la kolero de Don Karlos kvietiĝu.

Miksaĵo da ĝdolĉaj kaj maldolĉaj sentoj plenigis l'animon de l'Abenceraĝo unuflanke la certigo ke li estis amata kun tiom da fideleco kaj fervoreco estis por li fonto nekonsumebla de ĉarmegoj ; aliflanke la certeco neniam esti feliĉa sen forlasi la religion de siaj patroj nuligis la kuraĝon de Aben-Hamet. Jam

multaj jaroj estis pasintaj, sen malaperigi siajn suferojn ; ĉu li vidos tiele pasigi la ceteron de sia vivo ?

Li estis tute penetrata de la plej seriozaj kaj plej dolĉaj pripensoj, kiam vespere li aŭdis la sonon pro tiu kristana preĝo, kiu anoncas krepuskon. Li ekpensis eniri la templon de l'Dio de Blanka kaj peti konsilojn de l'Kreinto.

Li eliras, li alvenas ĉe la pordo de antikva Moskeo, nun preĝejo por Kristanoj.

La koro premigita pro malĝojo kaj religiaj sentoj, li eniris en la templon kiu iam estis tiu de siaj Dio kaj patrujo.

La preĝo ĵus finiĝis : neniu ĉeestis en la preĝejo.

Sankta mallumo regis tra multegaj kolonetoj, kiuj estis preskaŭ similaj al arbaj trunkoj de arbaro regule plantita.

La malpeza arkitekturo de l'Araboj miksiĝis kun la gota arkitekturo, kaj perdinte nenion el sia eleganteco, ĝi havis gravecon pli decan por meditado. Kelkaj lampoj apenaŭ lumigis la kavetojn de l'arkaĵoj ; sed pro la lumo de multaj brulantaj kandelegoj, oni vidis tamen brili l'altaron de l'Sanktejo ; ĝi brilegis per oro kaj multkostaj ŝtonoj.

Por la Hispanoj la tuta gloro estas senigi sin je siaj riĉaĵoj por plibeligi la kultajn objektojn, kaj la bildo de l'Dio vivanta meze de puntaj vualoj, per laj kronoj kaj rubenaj garboj, estas adorata de popolo duone nuda.

Oni rimarkis nenian seĝon meze de l'vasta templo : sur marmora pavimo, kiu kovris ĉerkojn, la riĉuloj kiel la malriĉuloj genufleksis antaŭ la Sinjoro.

Aben-Hamet malrapide paŝadis en la dezertaj navoj, kiuj resonis pro la bruo de liaj paŝoj. Lia spirito dividiĝis inter la memoroj, pri kiuj tiu antikva monumento de l'Matrua religio rememorigis lin, — kaj la sentoj kiujn la kristana religio naskis en lia koro. Li ekvidis malsupre de kolono senmovan figuron, kiun li une kredis statuo sur tombo. Li alproksimiĝas ; li vidas junan kavalaron surgenuiĝitan, kun frunto respekte klinita, kaj la brakoj krucigitaj sur la brusto.

Tiu kavaliro faris nenian movon je la bruo de l'paŝoj de Aben-Hamet ; nenia distraĵo, nenia ekstera signo de vivo maltrankviligis lian profundan preĝon. Lia glavo kuŝis tere antaŭ li, ka

lia ĉapelo, kovrita per plumoj, kuŝis flanke sur la marmoro; li ŝajnis fiksita en tiu sintenado per ensorĉo. Li estis Laŭtrek.

Ho! diris en si mem l'Abencerago, tiu juna kaj bela Franco petas de l'ĉielo ian gravegan favoron; tiu militisto, jam fama pro lia kurageco fervore preĝas la reĝon de l'Ĉielo, kiel la plej humila kaj la plej nekonata el la homoj. Ni preĝu do ankaŭ la Dion de l'kavaliroj kaj de l'gloro. »

Aben-Hamet ĵus ekklinis sur la marmoron, kiam li ekvidis je l'brileto de lampo, arabajn literojn kaj versikolon de l'Korano, kiuj duone aperis sub gipso falita. Konsciencaj riproĉoj reenigis en sian koron, kaj li rapidas por forlasi la templon, kie li preskaŭ iĝis malfidela al sia religio kaj al sia patrujo.

La tombejo, kiu ĉirkaŭis tiun antikvan moskeon, ŝajnis kiel ĝardeno plantita per oranĝarboj, cipresoj kaj palmoj, akvumita per du fontanoj; galerio fermita ĉirkaŭis ĝin. Aben-Hamet pasante sub unu el la portaloj, ekvidis virinon enirantan en la preĝejon. Kvankam ŝi estis envolvita per vualo, l'Abencerago rekonis la filinon de l'duko de Santa-Fe; li haltigas ŝin, kaj diras:

« Ĉu ci venas por serĉi Laŭtrek en tiu templo? »

— Forlasu tiujn vulgarajn jaluzajojn respondis Blanka; se mi ne plu amus cin, mi tion al ci dirus; mi malŝatus trompi cin. Mi venas tien preĝi por ci; ci sola estas nun la objekto de miaj deziroj; mi forgesas mian animon pro cia. Ci ne devis ensorĉi mian koron per la veneno de cia amo, aŭ ci devis adori la Dion, kiun mi preĝadas. Ci maltrankviligas mian tutan familion; mia frato malamegas cin; mia patro estas korpremita, pro ĉagrenoj, tial ke mi rifuzas elekti edzon. Ĉu ci ne rimarkas kiel mia sano malboniĝas? Vidu tiun rifuĝejon de la morto; ĝi estas ravega! Baldaŭ mi ripozos tie, se ci ne rapidos akcepti mian kredon antaŭ l'altaro de l'kristanoj.

« La turmentoj kiujn mi sentas iom post iom mortigas min; la pasio kiun ci inspiras al mi, ne subtenos ĉiam mian malfortan eston: pripensu, ho Maŭro, — por paroli lingvaĵon kiel la cia, — ke la fajro, kiu ekbruligas la torĉon, estas ankaŭ la fajro kiu konsumas ĝin. »

Blanka eniras la preĝejon kaj lasas Aben-Hamet korpremita pro tiuj lastaj vortoj.

Afero decidata l'Abenceraĝo estas venkata, li forlasos la era-rojn de sia religio; dum sufiĉe longa tempo li kontraŭbatalis.

La timo ke Blanka mortos superas ĉian alian senton en la koro de Aben-Hamet. Ja, li diris al si, la Dio de l'Kristanoj estas eble la vera Dio. Tiu Dio estas certe la Dio de noblaj animoj, ĉar li estas tiu de Blanka, de Don Karlos kaj de Laŭtrek.

Tiel pensante, Aben-Hamet senpacience atendis la morgaŭan tagon por informi Blankan pri sia decido, kaj ŝanĝi malĝojan vivon en vivo feliĉa kaj ĝoja.

Nur vespere li povis iri al la palaco de l'duko de Santa-Fe. Li ekkonis ke Blanka iris kun sia frato al la Generalejo, kie Laŭtrek prezentis feston. Aben-Hamet, malkvieta pro novaj suspektoj, rapidegas sur la postsignoj de Blanka. Laŭtrek ruĝiĝas ekvidante l'Abenceraĝon; kaj Don Karlos senafable akceptis la Maŭron, sed tamen ne kaŝis sian estimon.

Laŭtrek prezentigis la plej belajn fruktojn el Hispana lando kaj el l'Afriko en unu el la ĉambregoj de l'Generalejo, nomita la ĉambrego de l'kavaliroj. Ĉirkaŭ tiu ĉambrego estis alkroĉitaj la portretoj de l'princoj kaj de kavaliroj venkintaj la maŭrojn. Pelasĝo, Cido, Gonzalvo el Kordu'o. La glavo de la lasta reĝo de Grenad' estis alligita sub tiuj portretoj. Aben-Hamet malmontris sian doloron kaj diris nur, kiel la leono, rigardante tiujn pentraĵojn.

« Ni nescias pentri ».

La nobla Laŭtrek kiu vidis la okulojn de l'Abenceraĝo nevole rigardantajn al la glavo de Boabdil, diris al li

« Maŭra Kavaliro, se mi antaŭscius ke vi farus al mi la honon ĉeesti tiun feston, mi ne ricevus vin tie ĉi. Ĉiutage oni povas perdi glavon, kaj mi vidis la plej bravan el la reĝoj transdoni la sian al sia feliĉa malamiko.

— « Ho, ekkriis la Maŭro kovrante sian vizaĝon per parto de sia robo, oni povas perdi ĝin kiel Francisko 1-a, sed kiel Boabdil'! .. »

Noktiĝis; oni alport lumajojn; la interparolado fariĝis alia. Oni petis Don Karlos por rakonti la eltrovon de Meksiklando. Li parolis pri tiu nekonita mondo, kun la elokventeco eleganta, kiu estas natura ĉe la hispana nacio. Li diris la malfeliĉaĵojn de

Montezumo, la morojn de l'Americanoj, la mirigaĵojn de l'Kastiliana braveco kaj eĉ la kruelaĵojn de siaj samlandanoj, kiuj ŝajnis al li meriti nek laŭdon nek mallaŭdon.

Tiuj rakontoj ravis Aben-Hamet, kies pasio por la mirigaj fabeloj malkaŝis l'Araban sangon. Liavice li pentradis la Turkan imperion, ĵus fonditan sur ruinoj de Konstantinoplo, tamen donante bedaŭrojn al l'unua imperio de Mahometo; feliĉa tempo, kiam la kredulestro admiris ĉirkaŭ si, Zobeiron, Floron de Beleco, Fortecon de l'koroj, Turmenton kaj tiun noblan Ganemon, sklavon pro amo.

Laŭtrek siaflanke priparolis l'ameman kortegon de Francisko 1-a, la artojn renaskiĝantajn el la barbereco, la honoron, la lojalecon, la kavaliŝecon de l'antikvaj tempoj, kuniĝitajn kun la ĝentileco de l'civilizitaj jarcentoj; la gotajn turetojn ornamitajn per Grekaj ordenoj, kaj Gallajn sinjorinojn, kiuj pliriĉigis siajn ornamaĵojn per Atena eleganteco.

Post tiuj paroladoj, Laŭtrek, kiu deziris amuzi la diinon de tiu festo, akompanis sin de l'gitaro por kanti tiun romanson kiun li verkis laŭ monta kanto de sia lando :

Tradukis ELEDA KAJ VINKO

(*Sekvo ven's*)

---

## PAĜO DE L'DIREKTORO

**La Katolikaj Esperantistoj ĉe la II-a Kongreso de Esperanto en Genevo (1906).** Ni eldonis aparte tiun broŝureton, kiu enhavas la diversajn artikolojn publikigitajn en E.K. n-o 31, — t. e. : Benode Pio X-a. — Kunveno de la katolikoj la 31-an de aŭgusto. — En la preĝejo *St-François* (Diservo.-Prediko en Esperanto.-Kantoj). Prezo 0 fr. 15 centim., aĉetebla ĉe la Direktoro de E. K.-Bonege taŭgas, akompanata de Slosilo Ĉefec'a, por propagandi inter la katolikoj de ĉiuj landoj. Rapidu sendi vian mendon; la nombro de la ekzempleroj estas tre limigita.

**Preĝaro.** Ni ne povas ankoraŭ difini precizan epokon por la apero de l'Preĝaro. Ni preferas nerapidi, ol liveri malperfektan verkon. Ni memorigas, ke la prezo estos 3 fr. por la subskribintoj, kaj 3 fr. 30 por ceteraj. aĉetantoj.

Estos eble ne senutila klarigi tie ĉi kelkajn radikvortojn uzotajn en la Preĝaro.

1. *graco*. Ĝis nun oni uzis la vorton *favoro*. Sed, teologie *favoro* estas tro malpreciza. La vorton *graco* ni elektis pro ĝia latina deveno kaj ankaŭ pro sufiĉa internacieco : latine, *gratia*; france, *grâce*; angle, *grace*.

2. *mizerikordo*. Ĝis nun oni uzis la vorton *kompato* aŭ *kompatemo*. Sed la Dia *mizerikordo* estas io diferenca de simpla *kompatemo*, tial ke per ĝi Dio ne nur *kompatas*, sed efektive *helpas*. *Kompati* signifas latine *misereri*. Ni ne prenis *mizerikordo* por eviti la verban finaĵon *mizerikordii*. Ni do havos *mizerikordi*, *mizerikorda*, ktp.

3. *beata* (beateco, beatigi, beatulo, ktp.). Ĝis nun oni uzis *feliĉo*, *feliĉego*, (oni devus diri *feliĉegeco*), *feliĉigi*, *feliĉulo* (*feliĉegulo*) ktp. Tiuj vortoj ne sufiĉe esprimas la kristanan ideon de ĉiela *feliĉego*; kaj plie oni havos tre longajn kaj malbelajn vortojn, se oni volos uzi la *verajn* formojn (*feliĉeguloj*, ktp.). La vorto *beata* estos do uzata en la traduko de *Confiteor*. — (*Sekva venos*).

**Du novaĵoj en E. K.** — Ni intencas doni du novajn *rubrikojn* :

1-e.-*Propaganda Kroniko*, en kiu ni konigos la agadon de niaj amikoj precipe en la katolikaro. Ni esperas, ke la liveritaj informoj kuraĝigos aŭ vekos la dormemulojn! Sekve, la nombro de l'propagandistoj duobligos kaj ni ricevos monate *amasejon* da informoj!...

2-e.-*Universala Komunikilo*. Frata helpo estas agada deviga principo inter la katolikoj; des pli kiam ili estas santempe esperantistoj! Ni do malfermas tiun rubrikon por ĉiuj informonekomercaj de niaj abonintoj. La informoj estos publikigataj *nur unufoje*. — Estos diversaj fakoj, sub diversaj titoloj, laŭ bezone.

**N.-B.** — Pro malsano (ne grava) de l'Direktoro, tiu numero aperas ankoraŭ malfrue, kaj enhavas nenion pri la nuna religia batalado, aŭ « kulturkampfo », en Franclando. La decembra numero, espereble, kontentigos niajn legantojn.

UNIVERSALA KOMUNIKILO

F. Rawicki, seminariano katolika, en Vloclavko, deziras korespondadi Esperante kun fremda Esperantisto ; se eble, kun alia seminariano.

Samideano deziras aĉeti *Abelly: Couronne de l'année chrétienne*. Eldonejo Périsset frères, Paris. Sendu informojn pri tio al la Direktoro de E. K.

---

EN ESPERANTUJO

OPINIO

Pri la « Revuo de Revuoj Esperantistaj ».

Tre Estimata Sinjoro,

Mi permesas al mi preni la liberecon por esprimi mian opinion ke E. K. dediĉas tro multe da spaco al recenzo de gazetoj. Laŭ mia opinio la enhavo de E. K. devas esti pure eklezia kaj katolika historio de la eklezio, biografioj de eminentaj ekleziuloj, priskribo de sektoj kaj de herezaj aperoj sur religia bazo, k. a., farus vian ĵurnalon tre altirema. Mi mem ne estas konfesanto de la ekzistantaj religioj, sed mi havas intereson al tiuj temoj, kiuj ekscitis kaj ekscitas ĝis nun la mondon.

Se mia opinio estas al vi malagraba, mi petegas pardonon, ĉar mi estas gvidata de la pura deziro de sukceso al via ĵurnalo, kiu en sia nuna stato (laŭ mia privata opinio) ne riprezentas sufiĉe klare la katolikismon.

Mi salutas vin plej bondezireme.

A. KOFMAN (el Odessa, Rusujo).

---

NOTETOJ

**Librairie de l'Esperanto** (Nova librejo Esperantista), 46, rue Sainte-Anne. Paris. S-o Warnier, kiu multe helpadis la komitataton, dum la II-a Kongreso en Genevo, — tre konata de l'Esperantistaro, — fondis en Parizo librejon, en kiu oni povas de nun aĉeti E. K. — Ni plezure ankaŭ avertas ke S-o Warnier havas la oficon kolekti anoncojn por E. K. (Vidu informojn pri tio sur kovrilo de E. K.).

**Esperanto-Manuel** (Esperanto-Lernolibro) de Gab. Chavet kaj



G. Warnier. 1 fr. ; kartonumita : 1 fr. 25. Plena kaj praktika kurso en 15 lecionoj. Tre rekomendinda.

**Esperanta Ligilo.** S-o Cart ĉiam daŭrigas sian humanan agadon por la blinduloj. Oni helpas lin abonigante blindulojn al la E. L. (3 fr. por ĉiu lando). Eliras, monate.

**Belega portreto de D-ro Zamenhof sur poŝtkarto.** Estas eldonita de firmo *Moller k. Borel*, en Berlino. Prezo : 10 ekzempl. por 1 fr. — 50 ekz. por 3 fr. 75. — Poŝtmarkoj estas akceptataj kiel pago. — Unu el la plej belaj poŝtkartoj.

**Cambridge Daily News**, de la 3-a de oktobro, publikigis tre interesan artikolon de P-o Rust pri *Esperanto kaj ĝia estonto*. Parolas pri la Diservo katolika. Ni plezure citas tiun frazon « La predikanto al la katolika Diservo, P-o Peliter, fariĝis mia fervora amiko. » — Tiuĉiokaze, mi memorigos la agrablajn momentojn, kiujn mi ĝuis dum la festeno ĉe *Hotel des Trois couronnes*, sidante ĉe l'tablo apud P-o Rust. (Em. P.).

**Malkaraj afiŝoj internaciaj por Propagando.** — La Grupo de Versailles ĵus eldonis propagandajn afiŝojn (en formo de 62 × 21-cmj. banderoloj.) redaktitaj nur en Esperanto. La vorto « **ESPERANTO** » per grandaj literoj altiras de malproksime la rigardon. Sub ĝi estas presita la konata frazo : « *Simpla, fleksebla, belsona, vere internacia en siaj elementoj, la lingvo Esperanto prezentas, ktp...* » tre taŭga por montri specimenon facile kompreneblan de nia lingvo.

Tiuj afiŝoj estos certe bonegaj propagandiloj, kaj tre taŭgos por vekti intereson al Esperanto, aŭ ĝin periode reveki, precipe antaŭ anonco de parolado aŭ malfermo de kurso. 50 ekzempleroj 1 fr. ; afrankite : 1 fr. 25. 100 ekzempleroj 1 fr. 75, afrankite 2 fr. 20. Sendu mendojn al S<sup>ro</sup> Corret, sekretario de l'Grupo, 12 rue de Vergennes, Versailles (Seine et-Oise). France.

**Esperantistaj Juristoj.** — Ni havas la honoron sciigi al vi ke dum la dua Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis sukcesege en Ĝenevo, la lastan monaton, estis fondata la « *Internacia Societo de l'Esperantistaj Juristoj* ». Vi facile sentas kiel utila, praktika kaj interesa estas kaj precipe iĝos per ĝia vastiĝo nia nova Societo. Ĝi kreos kaj konservos inter ĝiaj anoj

aferajn rilatojn, ĝi konigos al la fremdaj juristoj la samideanajn kunfratojn aŭ jurlaborantojn en ĉia lando, ĝi ebligos la sendon de aktaro en la plej malproksimajn regionojn, kun certeco trovi tie korespondanton kiu parolas kaj skribas nian lingvon, ĝi unuvorte unuigos la Esperantistajn juristojn de ĉiuj nacioj, k. t. p.

La unua fondinta ĝenerala kunveno decidis la kreon de rondironta ĵurnalo provizore manuskripta, kaj la preparadon de jurista vortaro, eldonota post aprobo de la Lingva Komitato. Jam aliĝis anoj de Anglujo, Francujo, Hispanujo, Irlando, Scotlando, Svisujo. Ni esperas ke vi bonvolos vin enskribi kiel eble plej rapide kaj samtempe sendi al la sekretario la malgrandan kotizaĵon fiksitan de la ĝenerala kunveno : 2 frankojn 50 centimojn, 2 ŝilingojn aŭ 2 markojn, ĉiujare.

La Societo elektis kiel prezidanton : S<sup>ro</sup> MICHAUX, advokato. Boulogne-sur-Mer (Francujo), kaj kiel ĝeneralan sekretario : S<sup>ro</sup> SERGEANT, advokato. Boulogne-sur-Mer (Francujo). Ĝi decidis ke ĉiu nacio elektus nacian vicprezidanton. *Pri ĉiuj sciigoj, sin turni al S<sup>ro</sup> SERGEANT, ĝenerala sekretario, 31, Bulvardo Mariette, Boulogne-sur-Mer (Francujo).*

**Oficejo de l'Esperanta Societo Sud-Ria-Granda en Porto Alegre' Brazilujo.** — Mi havas la honoron informi Vin pri la fondo, en P. Alegre, la 2<sup>an</sup> de Septembro de l'nuna jaro, de societo por la propagando de la internacia lingvo « Esperanto », de Dro Zamenhof, rusa kuracisto en Varsovio. Multe da societoj estas jam fonditaj en la tuta mondo por venkigi nian aferon. La « *Esperanta Societo Sud-Rio-Granda* » esperas esti honorata per amika interrilato kaj Via valora helpo. — R. Fred. Geyer, 1-a Sekretario. — *Oficejo : rua 7 de Setembro, 55.*

**Astronomio.** — Dum la Kongreso, en Genevo, okazis multaj kunvenoj por divers-fakaj specialistoj leĝistoj, matematikistoj, katolikoj, anarkiistoj, framasonoj, ŝakludistoj, k. c., k. c.; kaj oni fondis eĉ *Sciencan Sekcion*.

Tiu *Sciencan Sekcio* enhavos, verŝajne, diversajn sub-sekciojn, apartigotajn laŭ la diversaj fakoj : ĥemio, mekaniko, geologio, botaniko, k. c., k. c.

Inter tiuj ĵus cititaj, grava loko estos certe rezervata por astronomio.

Tial, ni kredas ke ni povas jam de nun utili la aferon, publikigante la jenan alvokon per kiu nia kara kunlaboranto, la klerulo F. de Roy, sin turnas al ĉiuj **Esperantistoj Astronomiistoj**.

Estas fakto certa ke la progreso de Esperanto multe dependas de l'kreo de teknikaj vortaroj, kaj, dum la lasta tempo, tre grava penado estas farita en tiu ĉi direkto.

Dezirante, en mia speciala fako, kunlabori al la afero, mi provis formi vortaron de astronomio kaj parencaj sciencoj.

Evidente, tia laboro ne povas esti la verko de unu homo sola.

Por ke ĝi havu ian valoron, estas necesa ke multaj Esperantistoj el diversaj landoj kunhelpu al ĝi. Jam en 1903, mi skribis al multaj personoj kaj grupoj en la tuta Esperantistaro, petante ke la astronomiistoj respondu mian proponon. Malŝance, krom DU esceptoj, Esperanto ne ŝajnis esti la lingvo de astronomio, kaj la verko senprogresis.

Mi nun ripetas kaj ampleksigas mian proponon, kaj forte petegas ke la Esperantistoj de ajn lando, kiujn la afero intereseas, bonvolu skribi al mi. Mi do esperas ke, baldaŭ, ni povos verki kaj presigi bonan vortaron por tiu scienco, unu el la plej internaciaj.

FÉLIX DE ROY, 342, chaussée de Turnhout,  
BORGERHOUT (Anvers) *Belgique*.

(kunlaboranto de LA BELGA SONORILO, membro de astronomiaj societoj de Belgujo, Anglujo kaj Francujo).

La esperantistoj de Sarria (apud Barcelono) havas l'honoron sciigi al vi, ke sub la nomo « **KVAR DIKSTREKOJ** » ili ĵus fondis grupon kies celo estas la propagando de la helpa internacia lingvo Esperanto en ĉi tiu lando. Estra komitato Honora Prezidanto F. Pujula Vallés. Prezidanto P. Huguet Campana. Kasisto J. Bosch Ximenis. Bibliotekisto C. Balsells Pellicer. Sekretario J. Mumbrú Ferrán, kies adreso estas : *Carrer de Catalunya, 5 SARRIA* (Barcelona). Hispanujo.

Esperantista klubo en Praha decidis, la 14<sup>an</sup> XI.-1906, ke ĝi prenos sur sin la taskon prizorgi la regulan kaj oficialan rapor-

tadon pri ĉio, kio povos interesi *bohemiajn*, parte eĉ fremdajn esperantistojn. La klubo eldonados de januaro 1907 novan gazeton skribotan en lingvoj *bohema kaj esperanta*, kiu enhavos krom beletrio ankaŭ la kronikon, bibliografion, raportojn de ĵus fondita bohema konsulejo, diversajn rubrikojn specialajn k. t. p.

Jare eliros 10 numeroj po 16 paĝoj. Abonprezo por fremdlando 3 fr. 75 (por Aŭstrio 3 kronoj).

Redaktoro de nova gazeto estas elektita S<sup>ro</sup> Ed. Kühnl, kiun kunhelpos redakcia komitato, — aro da spertaj esperantistoj. — Ĉio koncernanta la gazeton (abonpago, manuskriptoj, insertoj, k. a.) estu sendata laŭ adreso :

*Esperantista Klubo en Praha II-1322-Bohemujo.*

## BIBLIOGRAFIO

### VERKOJ DE D-ro NOEL

**Esther**, triakta tragedio de Racine (78 paĝoj), kun takta teksto de la ĥoroj, alkonformigita al muzikverkoj de *Moreau* kaj *Chaulieu*. — 1 fr. 25.

**Athali'**, kvinakta trag. de Racine (109 p.), teksto de l'ĥoroj por la muzikverko de *Mendelssohn*. — 1 fr. 50.

**Plutos'**, komedio de *Aristophanes* (76 p.). — 1 fr. 25.

**Rudens'** (La ŝnurego), de M. A. Plautus (107 p.). — 1 fr. 50.

Tiuj estimindaj verkoj de D-ro Noël, unu el la plej kleraj kaj lertaj esperantistoj, riprezentas grandegan sumon da laboro. — La tradukinto de *Ĉielo kaj Tero* (Byron), de *Rolandkanto*, ĉiam liveras al la esperantistaro vere modelan stilon. — La libroj ne estas *kompostitaj* sed *aŭtografitaj*, aŭ *stilografitaj* (?) — Aĉeteblaj ĉe la Direktoro de E. K., aŭ ĉe Librejo Buvignier, rue St-Georges, Nancy, (M.-et M.) France.

*Ĉe la sama libristo estas aĉeteblaj :*

**Pri Patrujo**, Parolado de S-o Laÿsise, tradukita de S-o Frécot, la fervora batalanto, kasisto de l'Grupo Nancy'a. (16 p. — 0 fr. 25).

**Unu jaron pli malfrue**, originale verkita de Prof. C. Thiaucourt, « *agregito* » por gramatiko kaj filozofio, prof. ĉe la Universitato Nancy'a. (32 p. — 0 fr. 25). — Ankaŭ aĉeteblaj ĉe *Esp. Kat.*

**ELDONOJ DE PRESA ESPERANTISTA SOCIETO**

**Esperanto et Croix Rouge** (france k. esperante). de Leŭtenante Bayol, Oficiro, Profesoro ĉe la Speciala Milita Lernejo de *St-Cyr*. — 125 p. kaj plie 40 p. por *speciala vortaro*. — Tre utila verko. — 1 fr.

**Du Rakontoj**, de D. de Rothau. — I. La blanka kastelo. — II. Esperantista Hotelo. (38 p. — 1 fr.).

**Kverko kaj Floro**, de E. de Amicis, kun permeso de l'aŭtoro tradukis S-ino Rosa Junck; sekvata de **Internaciaĵoj**. (90 p.) kun portretoj de l'aŭtoro kaj de la tradukintino. — 1 fr. 50. — Tidu kortuŝanta rakonto de l'fama Itala verkisto estis elegante tradukita de la ankaŭ fama *Kongresistino*, S-ino R. Junck. — Ni varme rekomendas tiun libreton.

**La Floro de l'Pasinto**, de E. de Amicis. Unuakta drameto el vivo Itala Tradukis S-ino R. Junck. Tiu plej interesa drameto estas aktita ĉe la Dua Kongreso, en Genevo. Ĉiuj Esperantistoj volos ĝin posedi. (Prezo ne montrita).

**ELDONOJ DE HACHETTE kaj K-o.**

**Fundamento de Esperanto**, de D-ro Zamenkof. Nova eldono pli malkara, ne kartonumita. — Enhavo: La *Gramatiko* en 5 lingvoj; la *Ekzercaro*; la *Universala vortaro*. (96 p. — 2 fr.).

**Universala Vortaro**, de D-ro Zamenhof. Reeldono. — 1 fr. 05.

**Ekzercaro** de D-ro Zamenhof. Reeldono. — 0 fr. 75.

*Novaj verkoj.*

**L'héritage Klodarec. Comédie en un acte** (Klodarec'a Heredaĵo; france), de F. de Ménil. La simpatia aŭtoro de nia *Esperantuja Himno* estas bone konata de ĉiuj esperantistoj. Li liveras per tiu verketo al la grupoj Esp. bonegan komedion propagandan. 32 p. — 0 fr. 75).

**Eneido**, de Virgilio. Trad. D-ro Vallienne. — Tiu ĉefverko de la latina poeto estas ankaŭ ĉefverko de l'tradukinto. Ĝi devas havi lokon en ĉiu biblioteko, flanke de *Hamlet* kaj *Roland-kanto*. (271 p. — prezo ne montrita).

**Anatomia Vortaro kvarlingva**: Latina, Franca, Angla, Esperanta. Verkita de la *Medicina Esp. Grupo*, prezidata de D-ro Ch. Bouchard. (76 p. — 1 fr. 05). Tre grava scienca verko.

**ELDONOJ DE MOLLER k. BOREL (Berlin).**

**Worterbuch Deutsch-Esperanto**, unter Redaktion von Dr. Zamenhof, publikigita de H. Jürgensen k. M. Pagnier. — Dua eldono. (277 p. — 2 Mark. — bele bindita en tolo : 2 M. 50).

**Esperanto Leitfaden.** Broŝureto 30-paĝa, lernolibreto propaganda. — Prezo ue montrita.

**Wilhem Tell**, kvinakta dramo de Schiller. Laŭ la versmetro de la germana originalo esperantigis : L. E. Meier (el *München*, mi pensas). Grava verko 150 p.) kiu meritas la saman sukceson kiel *Eneido*, *Julio Cezaro*, *Rolandkanto*. Aĉetebla ĉe S-o Fritz Wenk, Albananlage 7, Basel (Svisujo). Prezo : en Svisujo, 1 fr. 55; — en eksterlando : 1 fr. 70.

**Delmas'aj Helpaj Bildoj.** — Libreto klariga, de S-o de Beaufront. — Tre grandan servon faris S-o de Beaufront per la publikigado de tiu verko. Kvankam eble ĉiuj ne konsentos kun la tradukinto pri ĉiuj punktoj, pri ĉiuj esprimoj aŭ *novaj radikvortoj* proponitaj, tamen ĉiuj estimos ke la libro estas grandvalora kaj liveras al la profesoroj plej utilan lernigilon. — 1-a kajero (bildoj 1 ĝis 6) : 2 fr. — 2-a kajero (bild. 7 ĝis 16) : 3 fr. — Muraj Bildoj koloraj ĉiu 4 fr. 60. — Klariga libreto 1 fr. 25. — Apartaj surfoliaj bildoj ĉiu 0 fr. 30.

**MUZIKO**

**Kristnasko**, poezio de Th. Gautier, esperantigita de D-ro Philippet. Muziko de S-o L. Rigoir, 4-paĝa, tre bone litografita, kun bela kovrilo. Prezo : 1 fr. 50 (per poŝto : 1 fr. 55.). Ce l'aŭtoro L. Rigoir, 20, rue de Ormes, Charenton (Seine) France. La tradukisto sendis al la muzikisto jenajn komplimentojn « Mi al vi sendas dek mil dankojn kaj gratulojn. Vi ja bone komprenis kaj muzike tradukis la delikatajn versojn de Th. Gautier. — La unua akto (mi povas diri *akto*, ĉar via muzikaĵo estas kvazaŭ teatraĵeto), estas apetitdona ; la dua, penetranta ; la tria, ploriga. frost-tremiga ; la kvara. konsola. gajiga, triumfa. — Brave ! vi prenis ĉefverkon por doni al ĝi muzikan vesteton, kiu estas mem admirinda ĉefverko ! »

## ABONMONOJ RICEVITAJ

**I. Por la 3-a jaro abonon aŭ plenigon de abono ni ricevis de :**

F-ino Dussert. — Drudin (Lyon) ĝis Jan. 1907. — Grupo Rabata (Malto) por 2-a kaj 3-a j. — Grupo Murcia. — J. Martin (Ubeda, Hisp.). — Laperle (Montreal). — D-ro Soulier (Lyon). — A. Caroff (Ploudalmezeau). — Wicart (Roubaix). — P-o Requin (Draguignan). — P-o Robin (Azay-le-R.). — Barbaud (Vuillafand). — Jullien (Dijon). — Béloille (Paris). — Kolowrat (Paris? — via nova adreso?). — D-ro Savy (Valensolles). — Christofel (Brunswick). — Rivière (Angers). — Dubruelle (Tourcoing). — Hoskison (East Ardsley, Angl.). — Renovatien. — Touchebeuf (Lyon). — P-o Laisnez (Paris). — D-ro Dor (Lyon). — P. Champion (Avignon) — Gasse (Le Havre). — P-o Géant (Vésinet). — Hugo (Charbonnières). — P-o Rust (Soham, Angl.). — Du Faure de Lajarte (Paris). — Frère (Charenton). — Koffmann (Odessa).

*(Sekvo venos en decembra n-o)*

**II. Por la 4-a jaro : abonon ni ricevis de :**

Boyce (Un. Ŝt.). — Pouzole (Riom). — F-ino Dussert. — Riserre (Genevo) — Noël (Nancy). — F-ino Zabilon d'Her (Lyon). — M. Reynier (Lyon). — S-o Nankivell (Bere-Alston, Angl.). — Servais (Namur) por 2 abon. — D-ro Melin (Andenne, Belg.). — Laperle (Montreal). — D-ro Soulier (Lyon). — Barono Van Voont tot Voon (Fauquemont, Hol.). — A Frohns (Warstade, germ.). — Touchebeuf (Lyon). — Delarra (Douai). — Brazila Klubo (per Presa Esp. Soc.). — P-o Derroite (Paris). — Van Oevelen (Zoersel, Bel.). — J. Soisson (per libristo Poulain-Roche). — Michaelsem Copenhague (per lib. Boisselier). — D-ro Dor (Lyon). — Tellini (Udine, Ital.). — F-ino Magnier (Boulogne). — Fansharve (Bandhara, Hind.) per *British Ass.* — P-o Dommergue (Paris). — F-ino Roux (Saurmur). — Grupo Kaleza (Calais, ŝuldas ankoraŭ la 3-an j.). — S-ino Gilles (Boulogne). — Kazi-Girej (Karbin, nur 2 fr. 50, per S-o Moch). — E. Galard (Angers). — Denoncin (Reims). — Koffmann (Odessa). — Parenty (Audinghen). — Gonder



(Sliema, Malto). — Wagner (Stanislaŭ, Austr.) — D-ro Malato (Portalegre. Portug.). — Mgr. Pasquier (Angers). — Couraud (Belle-Ile-en-Mer). — S-ino Bastoul (Dijon). — Thill (Plymouth, Angl.)

(*Sekvo venos en decembra N-o*).

### MONOFEROJ POR E. K.

S-o Evstifeieff 102 fr. (100 kronoj). — S-o Devoucoux (Alfortville) 1 fr. — D-ro Noël (Nancy) 11 fr. — F-ino Dussert (Monestiër-de-Clermont) 1 fr. — S-o Drudin (Lyon) 1 fr. — F-ino Lagoguey (Paris) 20 fr. — P-o Derroite (Paris) 1 fr. — P-o Bianchini (S. Quirinode Pordenone, Ital.) 2 fr. 50. — S-ino Gilles (Boulogne) 2 fr. — S-o Parenty (Audinghen) 1 fr. — S-o Thill (Plymouth, Angl.) 13 fr. 25. — S-o Mistler (S. Claude) 2 fr. — S-o Champion (Avignon) 5 fr. — Anonimo : 4 fr. — **Sumo** : 156 fr. 75.

Antaŭaj donacoj 514 fr. 50 + 156,75 = 671 fr. 25.

Restanta ŝuldo 700, — 671,25 = 28 fr. 75.

La alvoko de nia altestimata Bonfaranto, S-o Evstifeieff, estis aŭdita de niaj amikoj. Koregan dankon al ĉiuj.

(LA DIREKTORO).

### PENSOJ

Tempo ? Kio estas 'do tempo ?..... Mezuro, spaco ?....., tiel mallonga por la ĝojo kiel longa por la doloro !

— La sola paradizo, el kiú ni ne povas esti forpelataj estas la rememoro.

— Al la danĝero konvenas la fiereco, al la feliĉo la humileco.

— La vesto de junulino estas ordinare la spegulo de ŝia animo, la termometro de ŝia korpureco. (La Fontaine).

— Plenumitaj devoj estas la vera feliĉo.

— Laboro forigas de ni tri grandajn malbonojn la enuon, la malvirton kaj la mizeron.

— Amo sen reamo estas demando sen respondo.

Esperantigis : CH. ZACHERL.

## ŜAKOJ

(Sub la redakcio de John Ellis, el Keighley (Anglujo).

Jen estas tri beletaj ludoj, luditaj ĉe la lasta Majstra Konkurso en Ostend'o. Mi prezentas ilin al la pli lertaj legantoj de tiu ĉi paĝo, sed mi deziras averti la lernantojn, ke kelkaj punktoj restas netraktite en la serio de ŝaklecioj. Tiujn punktojn, ne tre gravajn, sed tamen sciindajn, mi pritraktos pli malfrue.

## LUDO VI. — Ruy Lopez.

Leonhardt.	Cohn.	Leonhardt.	Cohn.
1. S — 4 R	S — 4 R	15. Ĉ — 4 T	K — 3 R
2. Ĉ — 3 KR	Ĉ — 3 KD	16. TD — 1 D	T — 1 Ĉ
3. K — 5 Ĉ	Ĉ — 3 K	17. S — 3 KD	T — 1 R
4. Reĝsaltas	Ĉ × S	18. S — 4 ĈD	K — 4 KR
5. S — 4 D	K — 2 R	19. T — 2 D	S — 3 K
6. D — 2 R	Ĉ — 3 D	20. TD — 2 R	K — 5 R
7. K × Ĉ	SĈ × K	21. D — 3 Ĉ	K — 3 Ĉ
8. S × S	Ĉ — 2 Ĉ	22. S × S	S × S
9. T — 1 R	Reĝsaltas	23. S — 4 T	R — 1 K
10. Ĉ — 3 K	Ĉ — 4 K	24. T × K	T × T
11. Ĉ — 4 D	Ĉ — 3 R	25. K — 5 K	K — 5 R
12. K — 3 R	Ĉ × Ĉ	26. S — 3 K	R — 2 K
13. K × Ĉ	S — 4 D	27. K × T	D × K
14. D — 3 R	S — 3 TD	28. S × K Kaj gajnas.	

## LUDO VII. — Kuriera Ludkomenco.

Spielmann.	Reggio.	Spielmann.	Reggio.
1. S — 4 R	S — 4 R	12. S — 6 Ĉ	SK × S
2. K — 4 K	Ĉ — 3 KR	13. S × S	S — 3 TR
3. S — 3 D	K — 4 K	14. T × S	T × T
4. Ĉ — 3KD	S — 3 D	15. K × T	Ĉ — 2 R
5. S — 4 K	Ĉ — 5 Ĉ	16. K — 7 K (ŝ)	R — 1 K
6. S — 5 K	D — 5 T (ŝ)	17. K — 5 Ĉ	K — 5 Ĉ
7. S — 3 Ĉ	D — 4 T	18. R — 2 D	S — 3 K
8. S — 3 TR	K × Ĉ	19. T — 4 KR	K — 4 KT
9. D × Ĉ	D × D	20. S — 4 Ĉ Cedas, ĉar se	
10. S × D	K — 3 C	20... K × S (5 Ĉ); 21 T — 1TR!	
11. S — 5 Ĉ	Ĉ — 3 K		

## LUDO VIII. — Ludkomenco Ponziano.

Reggio	Post.	Roggio	Post.
1. S — 4 R	S — 4 R	14. TR — 1 D	....13. Ĉ — 3 K
2. Ĉ — 3 KR	Ĉ — 3 KD	15. TD — 1 K	K — 3 D
3. S — 3 K	S — 4 D	16. T — 5 K	TR — 1 R
4. D — 4 T	S — 3 K	Bela atakema iro. Se K × T. la Da-	
5. K — 5 Ĉ	Ĉ — 2 R	mo estus fikŝota.	
6. S × S	D × S	17. Ĉ × K	16 D — 1 Ĉ
7. S — 4 D	R — 2 D	18. D — 5 Ĉ	R × Ĉ
8. K — 3 R	S × S	19. S — 5 D	TD — 1 Ĉ
9. S × S	Ĉ — 4 R	20. T × S	Ĉ — 1 D
10. Ĉ — 3 K	Ĉ × Ĉ (ŝ)	21. S — 6 D (ŝ)	R × T
11. S × Ĉ	K × K	22. S — 7 D (ŝ)	R — 1 K
12. Ĉ × K	R — 2 D		Cedas.
13. R — 2 R			

Stranga iro, elpensita de Pillsbury ;  
ĝi estas pli bona ol ĝi ŝajnas.

N.-B. — Solvo de Problemo 9-a aperos en E. K. decembra.

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*) — Direktoro Pastro Laberthonnière. — Administracio: Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris; abono jara: 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia!

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro: Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio: Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono: 23 fr. (En Franci. 20 fr.) 110 paĝoj duonmonate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

IL CITTADINO ITALIANO, duonmonata gazeto en Itala lingvo, raportas pri Esperanto kaj pri L. I. Enhavas bonegajn tradukojn de D-ro Josefo Loschi, Profesoro en Valombrosa *Reĝa Instituto Forsta*. Konsistas el 16 p. kiel *l'Esperantiste*. S-ro P-ro J. Meazzini, de (Arezzo Ital.) ricevis de la Direktoro la taskon redakti la esperantajn aferojn, artikolojn, anoncojn, bibliografiojn, ktp., kaj eĉ ricevi la abonpagojn el eksterlando (jare: 3 fr. 50).

➤ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO: 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro: XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝo de Bel-Artoj, membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

KOLEKTISTOJ: S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

## INSTITUTO DE MODERNAJ LINGVOJ

ANGLA, FRANCA, GERMANA, INTERNACIA

La Sinjoroj dezirantaj ellerni unu el la supraĵ lingvoj estas petataj sribi por pluaj sciigoj al la Direktoro:

S-o J. A. THILL, BARTON CRESCENT, PLYMOUTH, ANGLUJO  
NE PLI OL KVAR LERNANTOJ ESTOS

AKCEPTAJAJ SAMTEMPE

(10-2)

## L'AMERIKA ESPERANTISTO

Unua gazeto por la lingvo Esperanto en la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko. — Belege presata sur la plej bona kvalito de papero.

Jarabono: 1 dolaro; 5 frankoj; 2 rubloj; 4 markoj; 4 ŝilingoj; 5 kronoj. — Adreso L'amerika Esperantisto, Oklahoma City. U. S. A.

**PENSIO POR GESINJOROJ : GENEVO.** — S-ino RISER, 4, rue de Candolle. — Moderaj prezoj. Hejma vivado. Oni parolas en Esperanto.

**S-o PAULO KEILICH. COELN-LINDENTHAL,** gleüelerstrasse 135, (Germanujo), deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj; ĉiam respondas.

**S-o PAULO KEILICH, COELN-LINDENTHAL,** gleüelerstrasse, 135, (Germanujo), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Li sendos poŝtmarkojn germanajn. (3-2)

**LA REVUO.** — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D<sup>o</sup> ZAMENHOF. — Ce Hachette k. K<sup>o</sup> Paris. — Jare, Francujo : Fr. 6 ; ceteraj landoj Fr. 7.

**LINGVO INTERNACIA ESTAS NUN DUONMONATA.** — Envasas 32 paĝojn. Sen literatura aldono : 5 fr. — kun literatura aldono : 7 fr. 50. Adreso nova : Presejo Esperantista, 33, rue Lacépède, Paris, 5<sup>e</sup>.

**ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO,** abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

« **TRA LA MONDO** » (*Tutmonda multilustrata revuo esperanta*). — Nuntempaĵoj; arto, literaturo, sciencoj; komerco, industrio; militistaro, maristaro; teatro; sportoj; virina kaj gejunula paĝo; feliĉtono; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare : 8 fr. kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoŝtupoj.

**Pri unu speco de kurbaj linioj, koncernantaj la V-an Eùklidan postulaton.** Verkis Profesoro A. DOMBROVSKI . . . . . 0 fr. 65

**Pri novaj trigonometriaj sistemoj.** Originale verkis Prof. A. DOMBROVSKI . . . . . 1 fr. 80

(Aĉetebraj *po-grande* nur ĉe la Direktoro de E. K.)

**PREĜARO** (*en preparo*). Tri kajeroj, kies unua nun ekpresigas . . . . . 3 fr. 30  
Unua kajero . . . . . 1 fr. 10